

La Merkato

ISSN 0941-9306

*La estraro deziras al la membroj kaj simpatiantoj de IKEF
feliĉan kaj prosperan jaron 2005.*

Firefox: nun kun traduko de angla al Esperanto

Firefox, retkrozilo lanĉita antaŭ kelkaj monatoj, estu konkuranto de la ĉiea *Internet Explorer*. Jam haveblas helpprogramo por ĝi, kiu havigas bazan tradukon de anglalingvaj retpaĝoj al Esperanto. Instrukcioj por instalado kaj uzo estas je <http://traduku.mozdev.org/>. Ŝajnas esti interesa ilo por konsultantoj de (ofte nur anglalingvaj) retpaĝaroj de grandaj internaciaj instancoj.

Enhavo

Komercaj petoj kaj proponoj	3
Eŭropa Unio: Leĝaro - Multlingva Trezoro - Dogano - XBRL	4
Membroadministrado	5
Pensoj pri internacia komerco	6
Rimarkoj pri IKEV (daŭrigo de LM 96)	7-12

La Merkato (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef BRAUN, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; S-ro Silvio KNISS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. Ooba Atsua; S-ro WANG Tianyi **Revizoro por la financa raporto:** D-ro Gianfranco POLERANI. **Centra sidejo:** Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

Financa sidejo kaj membrara administrado:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert@pandora.be.

La jara **membrokoto** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoŝtanco) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokoto. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

Kontoj: - ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*

- belga poŝtekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

Perantoj

Internacie: Flandra E-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj@fel.esperanto.be)

Brazilo: Silvio KNISS MATES (silvio@siscobras.com.br; Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

Ĉinio: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco@public.xa.sn.cn

Francio: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso@aol.com

Germanio: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun@t-online.de

Hungario: D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, istvan.gether@office.ksh.hu

Italio: D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani@tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

Japanio: S-ro YAMASAKI Seikō, J-185-0014 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama@qf6.so-net.ne.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org, www.ikef.info aŭ www.ikef.net

Komercaĵoj kaj proponoj

Brazilo

Mi volas vendi amazoniajn kaj tropikajn fruktojn en ĉiujn landojn. Nuntempe mi havas: Asaio (euterpeoleraĉea mart.), Kupuasu (Theobroma Grandiflorum), kaj aliajn. Carlos Couto, Belem, rete carloscouto007(a)yahoo.com.br.

Ĉinio

SHAANXI ENERGY METALS AND MINERALS INTERNATIONAL TRADE CO., Ltd. importas diversajn mineralojn kiel ercojn manganan, feran, kromoferitan, kupran kaj aliajn por la ĉina metalurgio. Viaj informoj kaj ofertoj estas sincere bonvenitaj. Kontakto s-ron WANG Tianyi (Ĉielismo), rete: komerco(a)public.xa.sn.cn, informo(a)komerco.com, telefono: +86-29-82242215, fakso: +86-29-82622952 .

Litovio

Mi komencas denove mian malnovan okupon en komercado. Antaŭe mi okupiĝis pri rezervaj partoj kaj riparado de aŭtoj. Nun mi komencas labori en privata akcia kompanio 'BRRB' en urbo Vilnius, Litovio. Tiu firmao okupiĝas en pogranda komercado. Mi planas instaligi tie Esperanton ankaŭ. Stasys Kružinauskas, telefono: +370 5 2496233, fakso +370 5 2486232, mobila: +370 699 04065, rete Stasys(a)brrb.lt, www.brrb.lt.

Mi serĉas diverslande fruktojn kaj legomojn por importo en Litovion. Bonvolu sendi oferton. Rolandas Stramkauskas, urbo Varena, retadreso: veikla(a)voila.fr, telekopiilo: +370-31040533, telefonoj: +370-61393096, +370-60330195, +48-505505432.

Pollando

Mi invitas personojn el Ĉeĥio, Slovakio, Bulgario, Respubliko de Sud-Afriko, Usono, Kanado, Aŭstrio, Germanio kontakti kun mi. Ni povos kunlabori en tre grava kaj interesa branĉo: sano kaj sanigo. Pliajn detalojn petu de Andrzej Kiszkiel, Lubsko, rete akis2(a)o2.pl.

Tanzanio

Aloyce Magari, rete adekude01(a)yahoo.com, tanzania esperantisto, eta komercisto (kompanio 'LA ESPERO ŜTONO'), P.O. Kesto 23390, DAR ES SALAAM, okupiĝas pri vendado de mineralaj ŝtonoj (i.a. 'payright' aŭ per alia nomo 'fulgold').

Eŭropa Unio

Eŭropa Leĝaro

La tuta eŭropunia leĝaro ekde nun estas senpage konsultebla kaj traserĉebla je <http://europa.eu.int/lex/lex>. Samloke ankaŭ estas la oficiala EU-gazeto kaj la informoj pri eŭroponivelaj adjudikoj.

Eurovoc - multlingva trezoro

Aperis nova versio de Eurovoc, la multlingva trezoro (angle 'thesaurus', laŭ PIV: plena kolekto de vortoj, dirmanieroj, frazoj aŭ poemoj), uzata de la eŭropuniaj instancoj. Ĝi konsulteblas je <http://europa.eu.int/celex/eurovoc>. Enestas la lingvoj de la 'malnovaj' membroj kaj de kelkaj novaj: ĉeĥa, latva, litova, pola, slovaka kaj slovena. Sekvos estona, hungara kaj malta.

Retpaĝaro pri dogano renovigita

La Eŭropa Komisiono renovigis siajn retpaĝojn pri impostoj kaj dogano; nova adreso: http://www.europa.eu.int/comm/taxation_customs/common/about/welcome/index_en.htm. Ĝi estas precipe en angla lingvo; grandaj partoj ankaŭ estas en germana kaj franca. En ĝi estas i.a. regularoj, imposttarifoj, proceduroj... Eblas abonati novaĵleteron ('newsflash') kun aktualaj informoj. Ankaŭ estas ligoj al interesaj datumbazoj: i.a. 'VIES' (http://www.europa.eu.int/comm/taxation_customs/vies/en/vieshome.htm, por kontroli ĉu AVI-numero estas valida) kaj multlingva TARIC (http://europa.eu.int/comm/taxation_customs/dds/en/tarhome.htm, kun doganaj tarifoj).

XBRL - estonta unueca, interreta financa raportado por entreprenoj

Eŭropa Komisiono subvencias la enkondukon de XBRL (Extensible Business Reporting Language, etendebla entreprena raportada lingvo). XBRL estas usondevena raportilo, bazita sur XML, baza normo en interreto kaj elektronika eldonado. XBRL pliraciigos kaj senerarigos la diversajn financajn informojn kiujn entreprenoj devas transdoni al borsoj, akciuloj, impostinstancoj, k.t.p. Pli da informoj estas je www.xbrl.org kaj je aliaj adresoj (anstataŭu 'org' per landokodo, ekzemple 'de' aŭ 'fr').

IFEF-kongreso en Rumanio

Rodica TODOR, prezidantino de LKK, anoncas ke de la 7a ĝis la 14a de majo 2005 okazos en Brasovo, Rumanio, la 57-a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto Federacio (IFEF). La kongresa hejmpaĝo estas <http://57-ifef.rdsbv.ro>.

Membroadministrado**Nova retadreso**

207. S-ro Stasys KRUZINAUSKAS, Litovio: Stasys(a)brrb.lt (oficeje), stkruz(a)hotmail.com (private)

Nova membro

338. Auguste HUBERDEAU, 33, rue François Cevert, FR-72100 LE MANS, Francio

Re-aliĝoj:

87. S-ro Marcel DELFORGE, Rue des Glacières 16, BE-6001 MARCINELLE, Belgio, rete mardelforge(a)brutele.be

89. S-ro H. LAMILY, 14 Landseer House, MIDDLESEX, UB5 5NS, Britio, °1937, tel./fakso: +44(0)20-8842 4192, rete hensonhardik(a)yahoo.co.uk

Simpozio en Bulgario planita

En komenco de monato majo 2005, UPIEK, Unua Privata Internacia Esperanto Kursejo, Sofio, planas organizi internacian 2-3 tagan seminarion aŭ simpozion pri 'Esperanto - laborlingvo en EU kaj en aliaj partoj de la mondo kaj en NATO kaj aliaj (ne)registaraj organizoj'. Dezirontoj prelegi aŭ nur partopreni anoncu sin. Lasto Nikov, P.K. 497, BG-1000 Sofio, rete lasto11(a)yahoo.co.uk. Nur por partopreno: rete lastonikov(a)yahoo.co.uk, telefono +359 2 983 5084, mobila + 359 888 0313 50.

Novajoj de TAKE

La ĝenerala membrokunveno de la 24a de oktobro 2004 i.a. decidis ne plu eldoni la revuon 'La Domo'. La numero 44 (oktobro 2004) estas la lasta. 'La Domo' restos la nomo de priasocia cirkulero. Gravaj tekstoj aperos en 'Jarkolekto de TAKE'. La retpaĝaro (<http://take-esperanto.org>, <http://take.esperanto.free.fr/>) estos restrukturata. La jara kotizo restas 5 eŭroj (20 eŭroj por subtenanta membro, 17 eŭroj por kombinita membrototizo IKEF/TAKE).

Nova infomejo por komercistoj

Ekfunkcias Tefloro (<http://tefloro.icpcn.com>) kie oni povas libere publikigi komercajn informojn. Informas: Zhang Xuesong, Xinyang, Ĉinio, zxue(a)uea.org.

Pensoj pri internacia komerco

En nia Globa Vilaĝo ni ne plu povas eviti unuj la aliajn, des pli ni bezonas unuj la aliajn. Tamen, eble vi konsentas, ke en nia faka mondo ne estas loko por laikoj - aparte ne en komerco. Sukceso apartenas al la kompetenta fakulo, kiu precize scias tion, kion oni bezonas aĉeti aŭ vendi.

Pro nia sperto de preskaŭ duona jarcento pri internacia komerco (ekde 1958), nepre ni negocas nur kun fakuloj - tiuj, same kiel ni, kiuj trovas siajn interesojn haveblaj ene de la intereso de siaj kun-negocantoj.

Kutime ni negocas pri metalaj malpezaj industrioj, ties krud-materioj, konstruo-materialoj kaj ekipaĵoj, pumpiloj, man-, elektraĵoj kaj ne-elektraĵoj, drat-produktaĵoj, vent-muelej-farmoj por produkti elektran potencon, kaj similaj varoj. Se aĉet-enketo temas pri alispeca varo, kies liverfonto estas alirebla al ni, ni ne hezitos esplori eblecon oferti.

Aĉet-fakulo scias, ke oni kutime funkciigas pagon per letero de kredito tra sia banko, pere de kiu oni indikas la priskribon de menditaj varoj kaj la jam interkonsentitaj kondiĉoj pri pago.

Ni preferas eksporti el Britujo, kie ni povas pli bone administri la negocojn. Ĉar ni atendas negoci kun fakuloj, ni ekspektas, ke ni frontos minimumon da problemoj - sekve malpli da laboro. Tiam do ni inkluzivas modestan procentaĵon por kovri nian klopodon.

Nia principo estas negoci kun fidindaj partioj - ĉu liveristoj, ĉu aĉetantoj, kaj ni klopodas protekti la interesojn de ĉiuj partioj de la negocoj laŭ interkonsento. Ni do deziras inviti fakajn aĉet-enketojn kaj promesas kiel eble plej bone klopodi plenumi iliajn bezonojn.

Temas pri preciza aĉet-enketo, ekzemple, se iu skribos petante pri ofertoj pri ŝraŭboj kaj ŝraŭbingoj, oni atendas de tiu detali: (a) la uzo-celono de la ŝraŭboj, (b) priskribon de ties speco, (c) kvanton de ĉiu granda (mezuro), (d) kiun markon, (e) specon de pakado, k.t.p. laŭ oniaj apartaj bezonoj, ankaŭ manieron de transporto (ĉu surmare, ĉu surlande, ĉu aere), laŭ kia asekureco, ĉu kontraŭ ĉiuj iskoj aŭ nur kontraŭ perdo de pecoj aŭ ties difekto, al kiu cel-stacio (adreso) de la respektiva konsigno (ekspedo), kaj tiel plu.

Lamely Huseyn, administranto de LAMELY (UK)

14 Landseer House, Middlesex, UB5 5NS, Britujo, telefono/fakso: +44(0)20-8842 4192, portebla: 077990 31346, rete hensonhardik(a)yahoo.co.uk

RIMARKOJ PRI "INTERNACIA KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO" (IKEV)*(daŭrigo de la antaŭa numero)***5) Postulado**

(...)

Tio signifas eblecon en uzo de alternativoj en formo de "propono" kaj "postulo" aŭ "proponado" kaj "postulado". Pli bone estas uzi terminon "postulo" ol "postulado". Tio estas ebla kompromiso, sed estas plej bone enkonduki novan vorton "domando". Vortoj kiuj estas similaj ekzistas en angla (demand), franca (demande), itala (domanda), hispana (demanda) kaj portugala lingvo (demanda). En Esperanto jam ekzistas vorto "domando", sed se unu sono diferencigas estas sufiĉe por nova vorto (kiel estas domando). En iuj vortaroj, ankaŭ en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV) ekzistas vortoj "oferto kaj mendo". Oni uzadas, interalie por "postulo", vortojn "aĉetemo" kaj "serĉado". Tiel oni plivastigas neprecizajn kaj nenecesajn vortojn. Ĉiu (po unu) vorto devas efektiviĝi nur per unu preciza signifo.

6) Direkcio – management (sub 1564) – Direktion - direction

Propono kaj ekspliko: En aliaj lingvoj ankaŭ ekzistas samaj radikoj por "direkcio". Uzado de termino "direkcio" rilatas al fakaj servoj kadre de entreprena sidejo, inkludante afergvidantajn funkciojn. Sed oni devas diferencigi anglan vorton "management" en senco de la scienco kaj sperto pri mastrumado kaj organizado en entreprenoj. Nature, ekzistas specialaj fakultatoj, altaj lernejoj, seminarioj kaj aliaj edukaj programoj por "management", inkludante tiun nomon, en tuta mondo senrigarde de nacia lingvo. Por longa tempo estas bone reteni originalan vorton "management" kiel unua termino kun tradukita termino "mastrumado" aŭ "negocmastrumado" kiel dua termino. Eblas uzi vortojn "negocado" kaj "administrado".

7) Merkatado – marketing – Marketing (Vermarktung, Absatzwesen) – marketing (commercialisation)

Propono kaj ekspliko: En aliaj lingvoj intermiksiĝas vortoj "marketing" kaj vortoj en senco de komercigo. Estas pli bone reteni originalan terminon "marketing" en senco de scienca subjekto en fakultatoj, faklibroj kaj aliaj problemoj de apliko de tiel nomata "marketing-koncepto". Sed estas bone aprobi merkataĵon kiel tradukita vorto en pli ofta uzado de tiuj terminoj. Ne estas bone en kunteksto de "marketing" uzi terminon "komercialigo". Ekzistas vorto "merkatumado" en Fervoja Terminaro, sed estas pli bone uzi terminon "merkataĵo" en senco de "marketing". En kazo de termino "marketing mix" estas bone uzi originalan terminon kaj tradukitan vorton "merkataĵa mikso". Ekzemple por iuj terminoj kiel "benchmarking" nun estas malfacile trovi bonan tradukon (ebla traduko estas kompara esploro), eĉ estas pli bone uzi originalan terminon. Problemo de neologismoj serĉas paciencon por kvalitataj solvoj.

Estas necese uzi originan francan terminon "acquis communautaire" kiel "komunaj spertoj" en Esperanto (aplikado de leĝoj kaj gvidlinioj Eŭropa Unio), ankaŭ en alternativa uzado.

8) Kostloko – cost centre (sub 570) – Kostenstelle – centre de frais

Propono kaj ekspliko: Oni devas diferencigi vorton "kostloko" kiu estas en organiza skemo malpli larĝa ol termino "centro de kostoj". Unue oni prezentas kutime nur kelkajn laborlokojn kiuj faras parton de teknologia kaj teknika procedo en unu fazo de produktado. Due estas kutima parto de entrepreno en kiu oni kalkulas kompletajn kostojn (sed en kazo de profitcento - enspezojn).

9) Variaj kostoj – variable costs; variable charges (sub 2722) – veränderliche Kosten; variable Kosten – frais variables – costi variabili (itala)

Estas bone uzi terminon "variabilaj kostoj" en Esperanto.

10) Ero – item (sub 1494) – Buchungsposten – article; écriture

Ne estas bone uzi terminon "ero" ĉar ĝi estas substantivo kreita surbaze nur de sufikso. Propono estas por uzi anglan vorton – "item", en Esperanto "itemo".

11) Brutta nacia produkto – Gross national product (sub 119) – Brutosozial – produit national brut

Estas necese enkonduki ŝanĝojn en tiu termino, ĉar ekzistas "Gross domestic product" – "Brutta enlanda produkto" (kun du konsonantoj kiel en PIV, kaj ankaŭ prilabori aliajn ekonomiajn kategoriojn ligitaj el ĉi-tiu kampo (neta produkto k.t.p.)

12) Profito – profit; revenue; income (US) - (sub 2016) – Gewinn – Profit – Nutzen - profit; bénéfice; gain

Oni povas rimarki ke sinonimoj en la angla lingvo ne respondas tute al veraj signifoj, sed por germana kaj franca lingvoj estas pli bonaj sinonimoj, sed ne la plej bonaj. Vortoj "Gewinn" kaj "Profit" estas sinonimoj – same kiel esperanta "profito", sed vorto "Nutzen" signifas "utilo" en Esperanto. Sed en itala lingvo por "profito" ekzistas vorto "utile". En ekonomika analizo povas ekzisti tiel nomata "socia utilo" aŭ "socia benefico", sed tio ne povas signifi senpere "profito" en kutima senco. En franca lingvo ekzistas vorto "bénéfice" kaj en hispana lingvo "beneficio". Estas bone enkonduki tiujn terminojn en Esperanto en la menciita senco. La hispana lingvo ankaŭ enhavas vorton "lucro", sed sama vorto ekzistas en la portugala lingvo. Tiu vorto devenas el latina vorto

"lucrum". Alia latina vorto estas "quaestus". Profito estas diferenco inter enspezoj kaj elspezoj. En iuj vortaroj oni intermiksas vortojn "profito" kaj "rento", inter kiuj ekzistas diferenco. Nome, termino "rento" ampleksas kelkajn signifojn. En angla lingvo ekzistas en vortaro terminoj: sub 196 "benefit of division; beneficium divisionis" kiu estas esperantlingve kiel "benefico de dividita ŝuldo" kaj sub 197 "benefit of execution; right of execution" - "benefico de ekzekucio".

Sub 1280 estas termino "income", kaj sub 2214 estas termino "revenue". Eventuale en la angla lingvo oni povas preni tiujn du vortojn kiel sinonimoj. Sed sinonimoj ne estas vortoj "profit" kaj "income", malgraŭ al tio ke ekzistas sub 2018 "Profit and loss account" kaj "Income statement" – esperantlingve "profit- kaj perdokonto" – germane "Gewinn-und-Verlustkonto" – france "compte de profits et pertes". Estas pli bone terminon "perdo" en Esperanto en tiu senco anstataŭigi per vorto kiun oni povas enkonduki per prefikso mal – "malprofito". Perdo ekzistas en diversaj sencoj (ekzemple, perdo de vivo, de produktado en materiala aŭ mona formo, perdo kiel domaĝo, perdo de privilegio k.t.p.) Sed "malprofito" estu financa rezulto kiel negativa diferenco inter enspezoj kaj elspezoj.

Intermiksado de diversaj terminoj ekzistas ekzemple en angla negocaj vortaroj kaj en esperantaj vortaroj. Terminoj por "enspezo" kaj "profito" estas la plej bonaj ekzemploj. Oni miksas specifajn terminojn kun jam menciitaj terminoj, ekzemple:

13) Rendimento – yield; return (sub 2810) – Ertrag; Rendite - rapport

Simila situacio estas en sekvonta ekzemplo por konata indikilo de efikeco:

14) Rentabilitato – profitability; productiveness; productivity; earning capacity (sub 2017) – Rentabilität – rentabilité

En aliaj lingvoj ekzistas sama radiko de vorto kaj afikso (morfemoj). En lasta tempo oni pli ofte uzadas terminon kiu havas radikon en vorto "profit-o", t.e. "profitability – profitabilitato". Sed ne estas bone en angla lingvo intermiksi vortojn "profitability" kun "productiveness" kaj "productivity". "Profitabilitato" (rentabilitato) estas financa indikilo kiu prezentas rilaton inter profito kaj kapitalo (aŭ enspezo). "Produktivitato" estas indikilo per kiu oni mezuras en kvanto da produktoj po unu laboristo (dunganto), aŭ en tempaj unuoj (minutoj) por produkti unuon de produkto. Por pli precize esprimi financajn kategoriojn oni devas diferencigi:

15) Enspezo – proceeds; return – Ertrag; Erlös – produit (de la vente); recette

En itala lingvo ekzistas vorto "entrata" (en IKEV). Traduko en Esperanto estas "eniroy".

Sed en aliaj vortaroj oni havas vortojn "rendita", "introito", "reddito" kaj "provendo". En angla lingvo ekzistas en tiu senco "income" kaj aliaj vortoj kiel "revenu" (kiel en franca), "receipts" kaj "recette", en germana lingvo "Einkommen", "Einnahme" kaj "Erlös". En nederlanda, sveda kaj norvega lingvoj ekzistas sama vorto "inkomst". Estas bone akcepti terminon "revenue" en Esperanto kiel "revenu" (diferenciĝas de esperanta "reveno") kaj anstataŭigi vorton "enspezo" kiu ne respondas en radiko al esenco de reala nocio. Oni devas diferencigi vortojn "sale" (angla) – "vendosumo" (esperante) kiu enhavas aldonvaloran imposton de "income – enspezo". "Vendosumo" estas mona valoro, sed per "vendokvanto" estas bone uzadi por nombro da produktoj, pezeco, longeco k.t.p. En la kroata lingvo (ankaŭ en serba) ekzistas vorto "prihod" (enhavanta du komponentojn "pri-hod" (esperantlingve oni povas traduki "pri" kiel "en" kaj "hod" kiel "iro", t.e. "eniroy" estas la plej bona traduko). En slovena lingvo por enspezoj estas "donosi" (en traduko "al-portoj").

Alia vorto estas "alveno" (en latina lingvo ekzistas vorto "adventus" por enspezo). Ekzemple, en rumana lingvo ekzistas vorto "venit". En la vortaro ne aperis vorto "elspezo" kun direkta difino, sed nur termino "kostoj". Vorto "expense" en latina lingvo estas la plej proksima vorto por "elspezo". En la angla lingvo ekzistas vortoj "expense" kiel en franca, eĉ "expenditure" kaj "cost". Por elspezoj oni povas konsideri tiun ekonomian fenomenon kiel eliron. En la itala lingvo ekzistas vortoj "spesa", "uscita", "dispendio", "consumo" kaj "sborso" kiel substantivoj. Kiel verboj ekzistas vortoj "spendere" kaj "consumare". En la itala lingvo ekzistas vortoj "introito kaj esito". En la kroata lingvo (ankaŭ en serba) ekzistas vorto "rashod" (enhavanta du komponentojn "ras-hod" – ras = dis), por kiu la plej bona traduko estas "eliroy". Samaj vortoj "prihod" kaj "rashod" ekzistas en la rusa lingvo. En unu parto de kazoj similaj vortoj ekzistas en aliaj slavaj lingvoj. En la slovena lingvo ekzistas vorto "odhodki" por "elspezoj". Komparado estas nepre procedo kiel universala lingvistika rimedo en analizo de ekonomika vortaro.

Estas nepre uzi en ekonomika kaj ekonomia terminaro vorton "elspezo". En IKEV ne ekzistas tiu vorto en memstara signifo kiel difino. Oni mencias kun terminoj "elspeza inflacio", "elspezolimigo", "troa elspezado" kaj "vendo-elspezoj". Elspezolimigo estas aro de restrikcioj por rebonigi ekonomian staton en entrepreno aŭ ŝtato, kiu en angla originalo estas "limitation of public expenditure" (sub 1493), en germana lingvo "Ausgabenbeschränkung", en franca "limitation de dépenses; restrictions des dépenses" kaj en itala "limitazione delle spese". Troa elspezado estas angla originalo "overspending", en germana "Ausgabenüberschuss", en franca "excès de dépenses" kaj en itala "spesa eccessiva". "Vendo-elspezoj" estas farataj por konservi aŭ plivastigi merkaton kiel estas anoncado, salajroj por komercaj aktivecoj, merkatesploroj k.t.p. – "selling cost – Verkaufskosten – frais de vente – spese di vendita". Estas senduba fakto ke morfemo "spez-" ne estas prava solvo en Esperanto. Oni devas klare distingi nociojn "enspezo" kaj "elspezo". En la kroata lingvo ekzistas vorto "izdatak" kiu enhavas du vortojn: "iz"

(el) kaj verbon "dati" (doni) en formo de substantivo kiel "datak" kreas vorto "izdatak" en signifo plej proksime al esperanta vorto "elspezo".

En esperantaj vortaroj estas verbo "elspezi (monon)". En la kroata (ankaŭ en serba lingvo) vorto "trošak" signifas "kosto" (singularo), "troškovi" (litero š = ŝ) signifas "kosto(j)" (pluralo). Per prefikso "u-" kaj vorto trošak ekestas nova vorto – "utrošak". Kosto(j), respektive "trošak" – "troškovi" oni uzadas en senco de monaj elspezoj, sed "utrošak" oni uzadas kiel ekzemple elspezon de materialo. En Esperanto tiu diferenco ne ekzistas, sed estas nepre pripensi pri tio. Eĉ, ekzistas problemoj ke vorto "en-spezo" en sama traduko al kroata lingvo estas "u-trošak".

Simila, sed ne sama vorto (faka termino) estas "kosto(j)", en angla "costs" (sub numero 583), germane "Kosten", france "coût", itale "costi", hispane "coste"; "costo; gastos", portugale "custo", nederlande "kosten" kaj svede "kostnad". En kadro de difino de kostoj sekvas ke "kosto(j) estas elspezoj kiujn oni faras, akirante la servojn de produkto-faktoro". Ne estas korekte difini ion sen antaŭe difini nocion kiun oni mencias en ĝi kiel grava parto de difino. En 16 terminoj oni uzas vorton "kosto(j)" (dispartigo de kostoj – cost allocation, postkalkulado – costing, kosto de vivteno – cost of living, k.t.p.)

Estas nepre plibonigi tiun parton de la vortaro, kaj pli precize difini unuopajn terminojn. En la vortaro ne ekzistas origina difino de nocio "negoc(ad)o". Terminoj kiuj en tiu senco (sintagmoj) ekzistas estas: "negocaj paperoj" (negotiable documents; commercial paper – sub 1709), "premuma negoco" (share option; stock option; option – sub 2319), "negocoj kun dato de enŝarĝo" (shipment transactions – sub 2327) kaj "negoco laŭ aĉetant-opcio" (transaction at buyer's option – sub 2621). Sub 2622 oni mencias "transaction for forward delivery" (livernegoco). Kiel estas evidenta negoco estas unuopa afero. Aro de negocoj kiel ekonomia aktiveco en entrepreno povas esti "negocado", ĉar ekzistas ĝenerala nocio "negoco" (negocado) kiu ampleksas diversajn aktivecojn en entrepreno el komerca kaj financa starpunktoj. En la kroata lingvo (ankaŭ en la serba) por negoco ekzistas vorto "posao" (en singularo). En pluralo ekzistas vorto "poslovi". Verbo estas "poslovati" (sen "ti" kiel formo de infinitivo, kaj sufikso "nje" respondas al esperanta –ad. Vorto "poslovanje" respondas al vorto "negocado".

En Esperanto estas bone enkonduki terminojn por diferencigi signifojn kiujn eblas esprimi en la angla lingvo – "politics" kaj "policy". En Esperanto vorto "poliso" signifas "dokumento atestanta pri asekuro". En PIV oni difinas "politiko" kiel 1. "scienco aŭ arto de regado de ŝtato"; 2. kiel "tuto de ŝtataj aferoj kaj 3. Kiel "maniero, kiel tiuj aferoj estas regataj". Estas bone enkonduki termino "policio" (diferencigas de "polico" kiu gardas ordon kaj sekurecon de civitanoj kaj ŝtato). Ekzemple ekzistas "monetary policy" (sed en Esperanto tio estas "monpolitiko"), kaj "inflation policy" (inflacia politiko). En tiu senco en estonteco se oni aprobas proponitajn terminojn, ekzistos "monpolitiko" kaj "inflacia policio".

MALLONGA TRARIGARDO PRI LA FERVOJA TERMINARO

En "Fervoja Terminaro" kiu ampleksas pli ol 12 mil fakajn terminojn en diversaj kampoj (fervoja tekniko, teknologio de transporto, ekonomio, juro) ankaŭ ekzistas problemoj pri precizaj difinoj. Terminaro evoluadas sub organizo kaj kunordigo de Internacia Fervoja Unio (UIC) kies sidejo estas en Parizo. En Fervoja Terminaro Esperanto-Franca kaj inverse Franca-Esperanto troviĝas vortoj kiuj ne prezentas la plej bonan solvon. Nome, estas grave akcenti ke la franca lingvo estas bazo por traduki originalajn vortojn al unue germana, kaj poste al angla lingvo. Al aliaj lingvoj oni tradukas laŭ eblecoj aŭ intereso. Ne estas bona traduko esperanta vorto "transportbezono" (sub signo kaj numero MA 20) por "demande de transport" (franca) – en angla "transport demand" kaj en germana lingvo "Transportnachfrage". En ĉi-tiu momento, kiel estas proponita, bona solvo estas "transporta merkatpostulo". En estonteco, se oni aprobas propono "domando" estas la plej bona solvo termino "transporta domando". Ankaŭ ekzistas termino "transportoferto" (sub MA 30). Laŭ IKEV estas necese distingi terminoj "oferto" kaj "propon(ad)o". En ĉi-tiu momento, kiel estas proponita, bona solvo estas "transporta merkat(o)propono". En estonteco, se oni aprobas proponon "ofro" estas la plej bona solvo termino "transporta ofro". Sub PC 30 en la vortaro estas "enspezoj" – "produits" en franca termino, sed sub FI 20 estas "trafikaj enspezoj" – "recettes" en franca lingvo. En iuj kazoj estas necese purigi Esperanton de nekonsekvenca praktiko. Pli bone estas uzi principon de frekvencomorfemaro en elektitaj lingvoj ol aplikon de sufiksoj kiel ad- aŭ uzi terminojn kiuj estas homonimoj en Esperanto, kaj ne ebligas precizajn signifojn okaze de aplikado de tiaj terminoj. La analizo kun proponoj por ŝanĝoj kaj aldonoj de tiu terminaro estas granda tasko.

FINA KOMENTO

Faka terminaro en ekonomiko, kaj en praktika ekonomia vivo, inkludante komercon, estas neanstataŭebla rimedo por atingi celojn – fari Esperanton kapabla por esti preciza en tiu agadkampo. Eblecoj de aplikado estas en statistiko, ekonomia politiko, negocadraportoj kaj en diversaj aspektoj de informado, merkatumado, ekonomiaj kaj sociaj esploroj, scienca kaj faka laboro. Pro tio ni devas kritiki la ĝisnunajn solvojn kaj enkonduki novajn vortojn kie estas nepre, kompari ekzistantajn terminojn kaj proponi kiel plej bone solvi problemojn de la faka terminaro. En tiu senco estas necese ŝanĝi kaj aldoni menciitajn partojn de IKEV. Interalie estas necese fari ŝanĝojn kaj aldonojn en Fervoja Terminaro de UIC, kaj eventuale en aliaj fakaj terminaroj. Ĉiu laboro postulas agnoskon kaj finfine kritikon.

La artikolo estis skribita surbaze de notoj por prelego kadro de Faka komisiono en la 56a Kongreso de IFEF, okazinta inter la 8-a kaj 15-a de majo 2004 en Sopron (Hungario).
D-ro Zlatko Hinšt (zlatko.hinst(a)hznet.hr)